

Bulgara **ESPERANTISTO**



Todor Jivkov. En la mateno de la nova tago ni rigardas kun certeco antaŭen	1
Q. K. Letero al usona amikino	3
Dimitr Osinin. Intervjuo pri la Dua Nacia Folklorfesto en Koprivštica	5
Bojka Batalska. La Sofia Studenta E-Societo „Vela Peeva“ gastis en Karlovo	6
Genčo Genčev. Sukcesoj de la Bulgara Sekcio de l'Internacia E-Asocio de Juristoj	7
Rosica Georgieva. El la E-vivo en Pazarĝik	8
Cv. Todorov, J. Dimitrov. Emocia esperantista renkontiĝo en Madara	8
Kunčo Vălev. La forestaj porinstruistaj E-kursoj ankaŭ ĉi-jare tre bone sukcesis	9
Nikolaj Bojaĝiev. Tradicia E-balo en Madan	9
Jan Ojalo Problemo tre grava kaj aktuala	11
Trojana esperantisto. El la agado de la esperantistoj en Trojan	13
Teodoro Kulagin. Pri la agado de la Moskva Internacia E-klubo (MIEK)	14
A. Ĥarkovskij. La taglibro de Taneev	15
Ivan Genov. Kolombo blanka	16
Evgenij Georgiev. Baleno kantisto. Kontinentoj proksimiĝas	16
* * * Tra la gazetaro. Deziras korespondi. „Esperanto-ripozoj inter amikoj“	17—18

Sur la kovrilpaĝo:

La I-grada foresta porinstruista E-kurso en Sofio kun gvidanto
Ivan Canev

Abonkotizo: jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2 lv., 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero — 0,14 lv. Reklamtarifo: 0,15 lv. por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespond-anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

EKSTERLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“ (Pliaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)

ALBANIO: Inĝ. Cefo Fiko, R. Kongresi Përmetit 7—11/10, Tirane.
ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.
KOREO: Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.
RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bukaresti 5.
SOVET-UNIO: Ivan Palkin, ul. Televidenija, D. 7, kcr. 3, kv. 44, Moskva M—449.
SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.



EN LA MATENO DE LA NOVA TAGO NI RIGARDAS KUN CERTECO ANTAŬEN

Jam pasis la X Kongreso de la Bulgara Komunista Partio (20—25 de aprilo j. k.). Preskaŭ dum unu semajno 1500 delegitoj el urboj kaj vilaĝoj, el konstruobjektoj kaj elektrocentraloj, el kampoj kaj montoj pridiskutis la ĝisnunan laboron de la Partio kaj la pluan disvolviĝon de Popola Respubliko Bulgario. Ili ankaŭ desegnis la perspektivojn de nia estonta evoluo.

Reprezentantoj de 89 komunistaj, socialistaj kaj demokratiaj partioj, naciliberegaj kaj revoluciaj movadoj el 82 landoj de ĉiuj kontinentoj ĉeestis, salutis kaj atente sekvis la laboron de la Kongreso.

La Deko Kongreso eniras la historion de la Bulgara Komunista Partio kaj de la bulgara popolo kiel kongreso, kiu akceptis la Programon de la Partio kaj per certa mano fiksas klaran vojon por konstruado de matura socialisma socio en Popola Respubliko Bulgario.

Resumante la laboron de la Kongreso la unuanime reelektita unua sekretario de CK de BKP kaj ministro-prezidanto de Bulgario k-do Todor Ĵivkov en sia ferma parolado interalie diris:

„La Deko Kongreso estas forumo de la bulgaraj komunistoj. Sed kun plena pravo ni povas diri, ke la Deko Kongreso de la Bulgara Komunista Partio estas kongreso de la tuta bulgara popolo. Dum ĉiuj ĉi tagoj en la kongresejo estis sentebla la ĉeesto de la homo el la uzino, de la laborulo el la kooperativaj kampoj, de nia popola intelekto, de la armeano el la armitaj fortoj, de la ordinara civitano de la lando. Tiu ĉeesto estis sentebla ne nur pro tio, ke ĉi tie faris eldirojn reprezentantoj de diversaj soci-tavoloj de nia popolo. Tiu ĉeesto estis sentebla, ĉar la tuta laboro de la Deko Kongreso estis penetrita kaj saturita de la granda sento de partia respondeco antaŭ la vivo, la sorto kaj la estonteco de l'ordinara laborulo, en kies nomo estas farata ĉio ĉe ni, kaj sen kiu povas esti farita nenio bona, nenio granda kaj grava en la vivo.

La decidoj de la Deko Kongreso estas diktitaj de unu penso, de unu zorgo: la feliĉo de la homo, la feliĉo de la popolo. Novaj uzinoj — tio signifas laboron por centoj da miloj, tio signifas novajn varojn por ĉiuj. Agrar-industriaj kompleksoj — tio signifas faciligon de la laboro de l'agrikulturistoj, tio signifas pli multan kaj pli bonkvalitan nutraĵon por la homoj. La ĝenerala mezgrada instruado, la novaj altlernejoj, la novaj sciencesploraj institutoj — tio signifas altigon de la kulturo de la vastaj popolamasoj, tio signifas novajn universitatajn diplomitojn, novajn kuracistojn, instruistojn, inĝenierojn. La decidoj de la Deko Kongreso en la plena senco de la vorto koncernas ĉiun familion, ĉiun domon, ĉiun civitanon de Bulgario — de la infanoj ĝis la pensiuloj.

... La eldiroj de la delegitoj kaj ankaŭ la salutparoloj de niaj karaj gastoj — senditoj de la frataj partioj — ankoraŭfoje pruvis la senrezervan

fidelecon de la Bulgara Komunista Partio al la principoj de la proleta internaciismo. Nia Partio estas neŝancebla en sia klara kaj konsekvenca strebado kunigi siajn naciajn taskojn kun siaj internaciaj devoj kaj respondecoj kaj, se necesas — subigi senhezite la apartan kaj provizoran intereson al la komunaj kaj daŭraj interesoj de la tutmonda komunista movado.

... Antaŭ cent jaroj la heroo proletaro de Parizo flirtigis la standardon de la unua en la mondo proleta ŝtatpotenco. La kontraŭrevolucia burĝaro dronigis en sangon la Parizan Komunon. Sed la ventoj de la historio disportis la fajrerojn de la impeta fajro de l'revolucio tra la tuta mondo. Unu el tiuj fajreroj brulpikis la koron de nia granda poeto kaj revoluciulo, gvidanto de la naciliberiga movado, antaŭulo de l'komunismo en Bulgario — Hristo Botev. En la tago, kiam la Deka Kongreso de nia Partio estis inaŭgurita, pleniĝis ĝuste cent jaroj de tiu tago, kiam la titano de la bulgara Renesanco eligis el sia granda koro la vortojn, kiuj fariĝis kredo de la tuta nia popolo.

„Mi kredas, — skribis ĝuste la 20-an de aprilo 1871 Hristo Botev, — je la unueca komuna forto de la homa gento sur la terglobo fari bonon. Kaj je la unueca komunisma sociordo, savanto de ĉiuj popoloj kontraŭ multjarcentaj suferoj kaj turmentoj per frata laboro, libereco kaj egaleco.

Kaj je la hela vivokrea spirito de la racio, firmiganta la korojn kaj la animojn de ĉiuj homoj por sukceso kaj triumfo de l'komunismo per revolucio.

Kaj je la unueca kaj nedisigebla patrujo de ĉiuj homoj kaj komuna propreco super ĉiuj havaĵoj.

Mi kredas je la ununura hela komunismo, korektanto de la sociaj difektoj.

Mi atendas la vekigon de la popoloj kaj la estontan komunisman sociordon en la tuta mondo“.

Tiutempe tio estis nia bulgara komunista manifesto. Aperinte en tempo, kiam Bulgario ankoraŭ suferis sub la kvinjarcenta fremda jugo, kiam ankoraŭ ekzistis nek bulgara burĝaro, nek bulgara industria proletaro, tiu manifesto signifis, ke la bulgara Renesanco, la bulgara naciliberiga movado ne kontentiĝos per la nacia liberiĝo, ke ĝi nature kaj logike transformiĝos en batalon por socia liberiĝo, por socialismo.

Dudek jarojn post kiam Hristo Botev proklamis la kredon de la bulgara komuno, la 2-an de aŭgusto 1891 sur la hajduta montopinto Buzluĝa Dimitr Blagoev kaj liaj kunbatalantoj fondis la revolucionan marksisman partion de la juna bulgara laborista klaso kaj flirtigis la ruĝan standardon de la komunismo.

La kredo de Botev estas saturita de inspiroplena internaciismo. La internaciismo estas la spirito kaj la litero de la unua, la Buzluĝa-programo de nia Partio. Flama internaciismo ŝprucas el ĉiu verso, el ĉiu sono de la kanto „Gelaboristoj el ĉiuj landoj, unuigu vin!“; ĝi estis lulkanto de nia movado — kiu gailis nin en strikoj kaj demonstracioj, en bataloj kaj laboro kaj kiu ankoraŭ nun tondras super la urboj kaj vilaĝoj de nia socialisma Patrujo kaj koncize kaj klare, ĝoje kaj alvoke esprimas la ĉefan, la fundamentan trajton de la bulgara komunista movado — ĝia proleta internaciismo.

Jen estas nia kongreshalo. Ĉi tie kolektiĝis la senditoj de la 700-milmembra Bulgara Komunista Partio, homoj de diversaj generacioj, kun diversa partia membrado. Kaj ĉiam, kiam oni ekparolis pri la internacia komunista movado, pri la Komunista Partio de Sovetunio, pri Sovetunio,



Kara sinjorino B.,

Hodiaŭ mi eksentis bezonon skribi al vi, ĉar mi subite rememoris pri la konversacio okazinta inter ni, kelkaj vjetnamoj, kun vi kaj kelkaj usonaj amikoj, kiam vi vizitis nian landon, en Hanojo, antaŭ tri jaroj. Ĉu vi tion ankoraŭ memoras?

Estis milde freŝa mateno. Kun voĉo emociita kaj entuziasmigita vi diris:

— Hieraŭ nokte mi ne povis ekdormi, aŭskultinte la prezidenton Johnson (Ĝonson) deklari, ke se la „Vjet Kong“ ne plu pafus kontraŭ la usonajn trupojn, ankaŭ tiuj lastaj ne plu pafus kontraŭ ilin. Do restas nur ke vi, vjetnamaj amikoj, tion deklaru, kaj la paco restariĝos. Mi tre ĝojas! Nu, alvenas la momento, kiam nia prezidento jam fariĝas saĝa! Baldaŭ pafoj ne plu aŭdiĝas en via belega lando. Miaj amindaj amikoj de Vjetnamio ĉesos suferi pro la milito, kaj niaj filoj el Usono ne devos fari ĉi tiun malpuran, malmoralan kaj danĝeran militon. . .

Vi miris, vidante nin ne dividi vian entuziasmon:

— Ho! Ĉu vi ne entuziasmiĝas aŭdante tiom ĝojigan novaĵon? Ja tio estas rezulto de dekjaroj da brava lukto de l'heroa vjetnama popolo. Do, ĵetu viajn ĉapelojn en aeron, disĵetu florojn surteren kaj kantu, kantu!

Tiam mi klare vidis, ke vi esperas bonaĵon por nia nacio kaj sopiras al paco. Sed mi devis respondi:

— Estas vere estimindaj viaj sentimento kaj sopiro. Tamen, bedaŭrinde, la kruela realo perfidas vian konfidon kaj vian esperon. La olivobranĉo de la usona prezidento estas saturita de toksaĵo, kaj malantaŭ ĝi estas prokrastita bombo. . .

— Kial? Ĉu pafhaltigo ne signifas finon de la milito?

— Estas kazoj, en kiuj la pafhaltigo signifas militĉesigon. Sed ĉi-kaze ĝi signifas daŭrigon de la milito.

— Pro vi aŭ pro nia prezidento?

— Kial vi pensas, ke la vjetnamia nacio, kiu estas suferinta la detruadon de tridek jaroj da milito, dezirus ankoraŭ plidaŭrigi la militon? Sed la

ĉiu ĉeestanto en la halo povis vidi per siaj okuloj kaj aŭdi per siaj oreloj la unuaniman spontanen esprimon de profunda estimo kaj rekono, de profunda, neŝanceblebla kaj nediskutebla senrezerva frata amo. Tiu ĉi frata amo transdoniĝas de generacio al generacio. Tiel estas edukitaj ni, la pli aĝaj. Tiel ni edukis la malpli aĝajn. Tiel niaj lernantoj edukas siajn lernantojn. Kaj tiel estos, tiel transdoniĝos de generacio al generacio, ĉar tio estas malnova kaj neelradikebla tradicio de nia Partio, sen ĝi nia Partio estos ĉio alia, sed ne Bulgara Komunista Partio.

. . . Dum la lastpasintaj jaroj socialisma Bulgario postlasis tiujn kapitalismajn landojn, kun kiuj antaŭ kvaronjarcento ĝi komparis sian kreskon. Dum la proksimaj jaroj ĝi postlasos ankaŭ multajn el tiuj evoluintaj kapitalismaj landoj, kun kiuj iam en la pasinteco ĝi eĉ ne kuraĝis pensi konkuradi. Firme solidara en la familio de la socialisma komuneco, apogite sur amikeco kaj kunlaborado kun la frataj socialismaj landoj, Popola Respubliko Bulgario sukcese plenumos la Programon de la Partio por konstruado de evoluinta socialisma socio kaj laŭ ĉiuj linioj starigos en la frunta kolono de la tuthomara progreso!”

problemo devas esti metita jene: vi kaj via familio vivas en via loĝdomo en Bookley. Grupo da homoj bruske entrudiĝas, perforte okupas la salonon, la manĝoĉambron, la banĉambron kaj eĉ vian liton. Vi kaj viaj hejmanoj forpelas ilin. Sed ili ne deziras forlasi vian domon. Eksplodas interbato. Iun momenton dum la batalo tiu bandaĉo, baldaŭ venkota, ĉar ĝitroviĝas en embarasiga situacio, diras: „Ni ne plu interbatu! Ĉiu kviete restu ĉe sia loko!“ Nu, vi pripensu: la demando ne estas en la ĉesigo de la batalo, sed en tio, ĉu tiu bandaĉo foriros el via domo kaj lasos al vi ĝin mastrumi. Se ne plu estos batalo kaj se ĉi tiu bandaĉo kontinuas okupi vian domon, ĉu vi tolerus tion?

— Ili devos eliri el mia domo, kompreneble!

— Jes, vi pravas, kaj tio estas la ĉefa problemo. Kaj se la ĉefa problemo ankoraŭ ne estas solvita. . .

Kara s-ino, ĉi tiu historio, malnova je tri jaroj, gardas ĉiam sian aktualan valoron. Freŝdate s-ro Nixon (Nikson) ankoraŭfoje parolis pri senkondiĉa pafĉesigo. Li ĉiuklopode sin mem akklamis pri „pacvolo“. Eble, li mem sin rigardas ankaŭ kiel fondinton de la paco sur ĉi tiu terglobo post la dua mondmilito. . .

Mi deziras daŭrigi la interparoladon inter vi kaj ni, komencitan tri jarojn antaŭe. Ĉar ankaŭ la novaj proponoj de s-ro Nixon estas nur renovigo de l'malnova intrigo. Du jarojn antaŭe, en la tagoj de la propagando por la prezidentaj balotoj, li elŝovis ĉaron plengitan per eksplodaĵo, tute kovritan per olivbranĉoj kaj portantan grandan ŝildon: „Ĉi tiu ĉaro iras al la paco!“ Sed, la ĉaro ne havis ĉevalon. Nixon invitis nin enĉariĝi. Ni rifuzis. Tiam li algluis kolombo-figuron, algluis pacsloganojn. Ni ankaŭ nun ne enĉariĝis. La publiko, inkluzive la usonanojn, tondre malaklamis: „Retiru la eksplodaĵon, alkonduku ĉevalon por ekirigi la ĉaron!“

Nun, en plena sezono de la balotpropagando s-ro Nixon, ĉiam plu tenanta la eksplodaĵon en la ĉaro, venigas ĉevalon. Li gestadas perpiede kaj permane kaj laŭtvoĉe diras: „Jen la ĉevalo! Ĉi-foje la ĉaro vere kurados!“

Kaj ĉe la mirofendiĝo de ĉiuj li jungas la ĉevalon al la malantaŭa parto de la ĉaro!

Pafhaltigo! Vera allogaĵo. Sed la nodo de la nuna vjetnama problemo estas jena: ĉu la agresuloj, iniciatintoj de la milito, rezignos retiriĝi senkondiĉe el nia vjetnama lando? Ĉu ili lasos nian popolon memmastrumi sian teritorion? La kaŭzo de ĉi tiu milito estas, ke la usonaj agresuloj armite invadis Vjetnamion, kaj ni, la vjetnamoj, por nia sendependeco kaj libero, kontraŭstaris la agresulojn. Necesas do funde solvi la problemon, t. e. ke Usono ĉesigu sian agreson, totale kaj senkondiĉe retiru la usonajn trupojn el Vjetnamio, nuligu la politikan ilon de ĉi tiu agreso — la pupojn en Sajgono. Nur tio ebligos la pacon. Nur kiam ĉi tiu problemo estos solvita, oni povos paroli pri pafĉesigo. . . Niaj reprezentantoj jam diris: ni garantios la sekurecon al la retiriĝontaj usonaj trupoj.

La sudvjetnama popolo, la vjetnama popolo, la popoloj de la tri hindoĉinaj landoj refutis la proponon el 5 punktoj de Nixon. Mi estas firme konvinkita, ke vi tute komprenas la justajn kaŭzojn de nia refuto. Kaj mi firme ankaŭ kredas, ke vi estas kune kun tiom da pacamaj kaj justamaj usonanoj, kune kun la vjetnama popolo kaj la tutmonda progresema homaro, kune postulantaj, ke s-ro Nixon forĵetu la tutan eksplodaĵon el sia ĉaro kaj jungu la ĉevalon al ĝia antaŭa parto, por ke la ĉaro havu la kondiĉon ekiri al la Paco.

Ni volas vin atentigi ankaŭ pri tio ĉi: kia pli granda indignigaĵo povas ekzisti ol tiu de aĉulo, kiu kunportas la problemojn koncerne la sorton de l'vjetnama nacio kaj de la vivo de usonaj junuloj por ĵongli en cirko kaj



(7—8. VIII. 1971)



En sia miljara historio la bulgara popolo kreis riĉan folkloron: kantojn, fabelojn, dancojn, popolkutimojn k. a.

Ekde dek jaroj en diversaj partoj de nia lando estas organizataj lokaj folklorfestoj, kiuj montras la belecon, vivkapablon kaj riĉecon de la bulgara popolarto.

Ĉio plej bela kaj interesa el la lokaj folklorfestoj prezentiĝas dum naciaj folklorfestoj. Ĉi-jare la Dua Nacia Folklorfesto okazos en la muzeo-urbo Koprivštica je la 7—8 de aŭgusto. Sur la podioj aperos folklorgrupoj kaj individuaj plenumantoj, kiuj kantos, ludos, dancos, rakontos popolfabelojn kaj humuraĵojn ktp., karakterizajn por apartaj folklorregionoj.

La folklorfesto en Koprivštica estos ornamita ankaŭ de unu stando de Bulgara Esperantista Kooperativo. Super ĝi flirtos la verda standardo de paco kaj amikeco.

La esperantistoj el Sofio, eble ankaŭ el aliaj lokoj, vizitos la Folklorfeston por ĝui la verkojn de la popola arto.

INTERVJUO

kun k-do DIMITR OSININ, bulgara verkisto kaj folkloristo, Merita Aganto de la Kulturo, prezidanto de la Centra Organiza Komitato de la Dua Nacia Folklorfesto

DEMANDO: *Kamarado Osinin, ĉu Vi estus afabla diri al ni, pro kio Koprivštica estas duafoje elektita kiel ĉefurbo de la Dua Nacia Folklorfesto?*

RESPONDO: Elekti Koprivštica kiel lokon de nia Folklorfesto ne estas hazarde. Ni havis kelkajn konsiderojn. Unue, ĉi tio estas la naskiĝloko de Ljuben Karavelov — elstara bulgara verkisto kaj unua scienca folkloristo el la epoko de la otomana jugo. Li estis kolekto de popolkantoj, proverboj, popolkutimoj k. a. kaj aŭtoro de multaj artikoloj. Karavelov la unua esploris la bulgaran folkloron. Due — inter la montaj urboj kun mezepoka nacia stilo Koprivštica estas plej bone konservita en arkitektura rilato. Kaj tio multe harmonias al la spirito kaj la etoso de la Folklorfesto; ĝi plaĉas al la vizitantoj el nia lando kaj el eksterlando. Alia konsidero estas la geografia situo de la urbo — en la mezo de nia lando. Kaj tio ne estas sen signifo por unu naci-festkunveno. Des pli ke Koprivštica estas

aĉeti voĉdonojn en la ĝeneralaj balotoj!

Akceptu niajn bondezirojn pri sano kaj bonfarto al vi kaj via edzo, bondezirojn al Emily, por ke, kreskante, li ne fariĝu kanonkarno en Vjetnamio aŭ en iu ajn alia loko sur la tero.

Q. K., vjetnama ĵurnalisto

malnova kaj tre alloga urbo, situanta en la pitoreska monto Sredna Gora. Ni insistas, ke oni ĉi tie tradicie organizu ĉiun kvinan jaron nacian feston de la folkloro. La loko de tiu nacia folklorfesto ne devas esti ŝanĝata.

Kompreneble, tio ne signifas, ke aliaj distriktoj ne povas organizi folklorfestojn kun karakteriza por ili temo. Oni daŭrigos la okazigon de originalaj revuoj de plenumantoj de popolartaĵoj: kantistoj, ludistoj je popolaj muzikinstrumentoj, rakontantoj de popolaj fabeloj aŭ nur de popolkutimoj. Jam ĝuas famon la hajdutfestoj en Sliven-distrikto, la kuker-festoj* en urbo Pernik k. a.

DEMANDO: *Kia estas la rolo de la Dua Nacia Folklorfesto en la atmosfero, kreita post la decidoj de la historia X Kongreso de Bulgara Komunista Partio por aktivigo de la popolaj fortoj por nova kultura kaj ĉiuflanka supreniro?*

RESPONDO: Ni kredas, ke la Dua Nacia Folklorfesto grave aktivigos la popolfortojn por novaj atingoj de nia nacia kulturo. Dum jarcentoj nia popolo kreis neripetebajn spiritalajn valorojn. Dum la antaŭstaranta Folklorfesto ni vidos ĝin ankaŭ kiel plenumanton de tiuj folkloraj. Karakteriza por la ĉi-jara Folklorfesto estas tio, ke ni unuafoje okazigas registradon de elstaraj plenumantoj de folkloraj laŭ difinitaj indicoj. Al ĉiuj registritoj — sendepende ĉu ili partoprenas la feston aŭ

* „Kŭker“ — maskito ĉe interesa bulgara popolfesto.



K-do Dimitr Osinin

ne — estos donitaj specialaj insignoj. Laŭ komuna rekono ankaŭ de l' eksterlandanoj, ni estas popolo kun plej riĉe konservita folkloro. Por eternigi ĝin ni plene registros ĉiujn materialojn de la Folklorfestoj.

Aparte ĝoje estas por mi noti, ke la Dua Nacia Folklorfestoj fermas unu gloran jardekon de la unuaj similaj festoj. Tial ni donos al ĝi ĝeneraligan, jubilean karakteron.

DEMANDO: *La bulgaraj folkloraj kantoj, dancoj, popolikutimoj k. a. ĉiam vekis intereson inter eksterlandanoj. Do, kiel vi trovas nian deziron per Esperanto popularigi la Duan Nacian Folklorfeston inter pli da popoloj en la mondo?*

RESPONDO: Mi ege alte taksas vian intencon popularigi la Folklorfeston en eksterlando per Esperanto. Tio kontribuos ankaŭ por kontentigo de la granda intereso, kiun ĝis nun montras la eksterlandanoj folkloristoj pri nia folkloro. Tio, kion vi faros, estas ankoraŭ unu formo de utila informado. Mi bondeziras al vi sukceson en tiu ĉi laboro.

Fine mi povas diri ankaŭ la jenon, kio estas interesa por eksterlandanoj. Niaj folklorfestoj estas originala bulgara fenomeno. Ili signas renesancon de la bulgara folkloro. Estas kortuŝaj okazoj, kiam maljunaj homoj — eĉ 90-aŭ 100-jaraj — rejuniĝas per iuj kantoj, ludoj kaj popoldancoj. Ni opinias, ke la folklorfestoj ĉe ni ne estas provizora fenomeno, sed ili fariĝas konstanta tradicio por pliriĉigo ankaŭ de nia socialisma kulturo.

Sofio, la 14 de majo 1971

Interŭjuinto Dimitr Mutuŝev

LA SOFIA STUDENTA ESPERANTO-SOCIETO „VELA PEEVA“ GASTIS EN KARLOVO

La 30-an de aprilo j. k. la naskiĝurbo de nia nacia heroo Vasil Levski renkontis nin per sia moderna kaj tre bela stacidomo kaj per la ĉarma vidaĵo de la proksima montaro. Nia 15-membra studenta grupo estis enloĝigita en bela hotelo, kie ni ripozis post la veturado. Sed la interkona vespero baldaŭ nin vokis en la elegantan kulturdomon. Tie ĉeestis esperantistoj ne nur el Sofio kaj Karlovo, sed ankaŭ el Kalofer.

Ekmuŝikis gramofono, kiu ĝojigis nin per belaj kanzonoj en Esperanto. La ĝojo kreskis ankoraŭ pli, kiam ekludis estrada orkestro, tiu sama, kiu estis premiita en la Junulara Festivalo en Jambol. Post la vesperamuzo ni promenis tra nokta Karlovo, kiu estas aparte bela.

La sekva tago komenciĝis per granda ekscito: ja estis la Unua de Majo — la granda festo de laboro kaj la internacia laborista solidareco. Ni eniris la esperantistan kolonon, kiu manifestaciis, kantante „Kamaradan kanton“.

Posttagmeze nia grupo vizitis la proksiman Sopot — la naskiĝurbon de l' patriarko de la nova bulgara literaturo Ivan Vazov. Kun granda intereso ni trarigardis lian naskiĝdomon kaj muzeon. Poste ni vizitis la monaĥejon de Sopot, kie multfoje kaŝis sin de la turkoj Vasil Levski. Alia tre interesa vidindaĵo, kiun ni vizitis, estis la akvomuelejo priskribita de Vazov en lia fama romano „Sub la jugo“.

Reveninte de Sopot, ni kun grandega intereso kaj plezuro trarigardis la naskiĝdomon kaj muzeon de nia nacia heroo kaj apostolo de la libero Vasil Levski. La domo estas malgranda kaj neriĉa, sed en ĝi naskiĝis kaj kreskis unika persono, kies kvalitoj de revoluciulo kaj homo metis lin por ĉiam en la vicojn de la senmortuloj.

La 2-an de majo ni vizitis najbaran urbon Kalofer kaj la muzeo-domon de alia glora bulgara revoluciulo, la granda poeto de la liberbatalo Ĥristo Botev.

Sed jam elĉerpiĝis nia tempo. Ni adiaŭis niajn amikojn — esperantistojn, la belan urbon Karlovo kun la pitoreskaj malnovaj domoj kaj reveturis al Sofio kun animoj riĉaj de impresoj pri neforgeseblaj vidindaĵoj kaj kun koroj plenaj de puraj patriotismaj sentoj.

B. Batalska



SUKCESOJ DE LA BULGARA SEKCIO DE INTERNACIA E-ASOCIO DE JURISTOJ

La Bulgara E-Sekcio de Juristoj, kiu membras en la Internacia E-Asocio de Juristoj, jam eklaboris aktive. Dum deko da jaroj ĝia agado esprimiĝis plejparte en partopreno en la universalaj E-kongresoj, kie bulgaraj juristoj faris prelegojn en la juristaj fakkunvenoj. Ĝis nun okazis la jenaj prelegoj: en Sofio (1963) kaj en Hago (1964) — „La koncepto de proprieto kaj ĝiaj limigoj en diversaj landoj“; en Budapeŝto (1966) — „La principo de egalrajteco de seksoj en la familia juro de diversaj landoj“; en Helsinko (1969) — „La rajto havi domon laŭ la juro de diversaj landoj“; en Vieno (1970) — „Kompensoj pro damaĝoj, kaŭzitaj de akcidentoj laŭ la juro de diversaj landoj“.

Post la 55 Universala E-kongreso en Vieno la agado de la Sekcio plivigliĝis. Rezulte de la klopodoj precipe de ĝia gvidanto, k-do Genčo Genčev, en novembro 1970 la Asocio de la Juristoj en Bulgario per unuanima decido akceptis la Sekcion kiel sian kolektivajn membron sub la nomo „Esperanto-Sekcio de Asocio de Juristoj en Bulgario“.

Post aktiva agitado inter la sofiaj juristoj, estis organizitaj 2 kursoj por juĝistoj, prokuroroj, jurkonsilistoj kaj advokatoj. La kursoj havis siajn lecionojn en la impona Justicpalaco centre de la urbo. Kursgvidanto estis la sperta E-pedagogo k-do Kunčo Vălev —lektoro de Esperanto en la Sofia Universitato.

Sukcese finis la kursojn 20 personoj, kiuj ricevis atestilojn. La fermo okazis per speciala kunveno komence de majo, antaŭ kiu k-do K. Vălev faris emocionan prelegon pri la lingvo Esperanto kaj la problemoj de internacia lingvo. Al li kaj al la gvidanto de la Sekcio oni prezentis riĉajn buketojn el ruĝaj rozoj. Esprimante la dankon de la gekursanoj, la nova esperantistino Teodora Paskaleva interalie diris: „Vi ambaŭ bruligis en niaj koroj la flamon de neestingebla amo al Esperanto kaj ĝiaj althumanaj ideoj pri paco sur la tero, pri frateco kaj solidareco inter la popoloj. Ni estas ankoraŭ novaj esperantistoj kaj ni faras erarojn, uzante la lingvon, sed ni laboras kaj ĉiam laboros por nia lingva perfektigo kaj por realigo de la nobla idealo de Esperanto!“

Ekde la komenco de 1971 sub aŭspicio kaj helpo de l'Asocio de Juristoj en Bulgario kaj per la kunlaboro de la Ministerio de Justico kaj la Sofia Advokata Konsilantaro, honore al la X Kongreso de BKP la Sekcio malfermis en la biblioteka halo de la Justicpalaco bone aranĝitan Esperanto-Legejon kun abunda E-literaturo: libroj (sciencaj kaj artaj), revuoj, ĵurnaloj,

lernolibroj kaj vortaroj. Arte ellaborita verda standardo kun la nomo de la Sekcio ornamas la legejon.

La estraro de la Sekcio elektis komitaton el spertaj juristoj-esperantistoj kun taskoj:

a) kolekti originalajn jurajn materialojn (artikolojn, monografiojn k. s.) de elstaraj bulgaraj juristoj, traduki ilin en Esperanton kaj sendi ilin al la Esperanta Jura Revuo.

b) Traduki bulgarlingven valorajn jurajn artikolojn de fremdaj juristoj, publikitaj en Esperanto en la sama revuo.

Tiamaniere ni uzos Esperanton kiel potencon rimedon por popularigi la bulgaran juron kaj leĝfaradon en fremdlando. Krome, ni konigos al niaj juristoj la ideojn de la fremdaj juristoj.

Antaŭstaras ankaŭ gravaj kaj urgaj taskoj:

a) Elekti kompletigitan estraron de la Sekcio;

b) Prezenti prelegojn antaŭ esperantistaj kaj neesperantistaj medioj;

c) Organizi novajn E-kursojn por komencantoj kaj por progresintoj;

ĉ) Arangi konstantan E-ekspozicion;

d) Prepari kaj eldonigi jurajn E-vortarojn;

e) Organizi aktivan korespondadon kun eksterlandaj esperantistoj;

f) Vastigi la agadon inter la juristoj en la tuta lando, organizante refreŝigajn kursojn por malnovaj esperantistoj.

Sub la aŭspicio de l'Asocio de Juristoj en Bulgario, gvidata de la noblaj principoj de la Bulgara Esperantista Asocio kaj de l'Internacia E-socio de Juristoj, la Bulgara Esperanto-Sekcio de Juristoj kuraĝe marŝas antaŭen.

Genčo Genčev

Parto el la finintoj de la E-kursoj en la Justicpalaco (Sofio) kun sia kursgvidanto





EMOCIA ESPERANTISTA RENKONTIĜO EN MADARA

La sunan matenon de la 25-a de aprilo j. k. en la turista domo apud la fama historia surroka ĉizaĵo de la Rajdanto de Madara kolektiĝis pli ol 100 esperantistoj el la distriktoj de Ŝumen, Târgoviște, Varna, Ruse, Razgrad kaj Tolbuhin. Okazis emocia kamarada renkontiĝo, dediĉita al la X Kongreso de Bulgara Komunista Partio.

La prezidanto de la Distrikta E-Komitato en Ŝumen, k-do Atanas Bojaĝiev, malfermis la kunvenon kaj inspiroplene parolis pri la historia signifo de la X Kongreso de BKP kaj ĝiaj decidoj. Post li la instruisto de historio Trajčo Dimitrov el Ŝumen faris entuziasmigan raporton lige kun la antaŭstaranta 1300-a datreveno de l'fondiĝo de la Bulgara Ŝtato ĉi tie, en tiu ĉi parto de nia lando pro kio ĉi lokoj estas sanktaj por ĉiu bulgaro. K-do Dimitrov parolis tre interese pri la glora historio kaj la revoluciaj tradicioj de tiu nia regiono.

Sekvis interŝanĝo de spertoj el la E-laboro. Parolis doc. G. Dimov kaj la veteranino de nia E-movado Zora Mladenova Hans — ambaŭ el Varna, Asen Doĉev el Târgoviște, Jordan Kalinov el Ruse, Ilija Andreev kaj Rajna Stanĉeva el Ŝumen k. a. Ĉiuj esprimis plenan unuecon kun la decidoj de la X Kongreso kaj pretecon kontribui por ilia realigo por la feliĉo de nia kara popolo.

Oni emfazis ankaŭ la neceson ĉiufланke aktivi la Esperanto-laboron lige kun la antaŭstaranta 38-a Kongreso de la bulgaraj esperantistoj en 1972. Unuanime la ĉeestantoj decidis, ĉiujare en la printempo oni organizu similajn E-renkontiĝojn en diversaj historiaj lokoj de tiu parto de nia lando — en Preslav, Aboba, Ruse k. a. Dum tiuj renkontiĝoj oni aranĝu revuojn de la amatora belarto de l'Esperanta junularo el la najbaraj distriktoj. Oni proponu al la CK de Bulgara E-Asocio organizi ankaŭ

ELLA E-VIVO EN PAZARĜIK

La 17-an de marto j. k. estis malfermita E-kurso por komencantoj en la Ekonomia Teknikumo — Pazarĝik. Kursgvidanto estas nia fervora juna s-ano Blago Blagov, kiu diplomigis pasintjare en la someraj porinstruistaj E-kursoj en Godeĉ. K-do Blagov dufoje en la semajno veturas el sia vilaĝo Ognjanovo por veni kaj instrui siajn 40 gekursanojn. Li gvidis ankaŭ grupon de 22 junaj esperantistoj al la Junulara Festivalo en Jambol.

La 21-an de aprilo denove vizitis nian E-kлубejon k-do Manol Ĉolev el Velingrad. Li parolis tre interese pri la 55 UK de Esperanto en Vieno, pri la vivo en Aŭstrio kaj montris kolorajn lumbildojn. Fine li invitis nin viziti la 12-an de junio kune kun la esperantistoj el Velingrad — la lokojn, kie la geesperantistoj-herooj Vela Peeva kaj Stoju Kalpazanov pereis en la kontraŭfaŝisma batalo.

R. Georgieva

Ĉiun el la estontaj kongresoj de la bulgaraj esperantistoj ĉi tie.

Fine la ĉeestantoj unuanime akceptis telegramon al CK de BEA.

Cv. Todorov — Ŝumen

J. Dimitrov — Ruse

BULGARAJ FILATELISTOJ, SEKVU LA VOJON DE VIAJ POLAJ KOLEGOJ!

En aprilo laŭ la iniciato de k-do Marian Kostecki — vicprezidanto de Pola E-Asocio kaj fervora filatelisto, en Krakovo fondiĝis Esperanto Klubo ĉe la Asocio de Polaj Filatelistoj. La klubo havas jam 53 membrojn el ĉiuj regionoj de la lando. Al ĝi rajtas aliĝi ĉiu filatelisto, kiu speciale interesiĝas pri Esperanto, kolektante poŝtmarkojn, poŝtstampojn, poŝtkartojn ktp., tute sendepende ĉu ili konas Esperanton aŭ ne. Sed la klubo korespondas kun siaj membroj nur en Esperanto, kio igos tiujn, kiuj ne scias Esperanton, lerni ĝin.

La 13-an de junio la klubo organizas tutlandan kunvenon por elekti plenrajtan estraron, anstataŭ la ĝis nun aganta organiza komitato.

KORESPONDA SERVO DE TEJO

eldonas bultenojn kun adresoj de korespondemuloj. Bonvolu sendi anoncon, menciante sekson, aĝon kaj interesiĝojn. Ĉiu anoncanto ricevos la bultenon.

ADRESO: Koresponda servo de TEJO, Toruń, Mickiewicza 6/10 (por Halina Magdycz) — POLLANDO.



LA FORESTAJ PORINSTRUISTAJ ESPERANTO-KURSOJ ANKAŬ ĈI-JARE TRE BONE SUKCESIS

Ĵam kreĝis tre bona sistemo instrui Esperanton al profesiaj instruistoj: dum la lernojaro — foresta kurso, en la somero — 20-taga ĉeesta kurso.

La meriton pri tiu ĉi bonega iniciato havas la Sofia Distrikta kaj Urba Komitato de la Bulgara Esperantista Asocio: unuafoje ĝi organizis tiajn kursojn nur por instruistoj de la Sofia Distrikto, komencante per 110 forestaj gekursanoj kaj en la somero per 48 ĉeestaj. Ekde la dua jaro, laŭ decido de CK de BEA, por la kursoj ekzorgis ankaŭ ĝia Instruista Sekcio. Oni varbis jam 240 ĝeinstruistojn por la forestaj kursoj, kiuj lernis en 9 grupoj diversloke en la lando, kaj 130 instruistojn por la someraj kursoj (en Godeĉ).

Dum la kuranta 1970/71 lernojaro oni varbis 224 ĝeinstruistojn, kiuj lernis foreste en 10 grupoj. Jen la konkreta strukturo de la kursoj:

I grado — 6 grupoj kun 157 gekursanoj (Sofio—42, Ŝumen—26, Targoviŝte—31, Popovo—14, Veliko Tarnovo—18, Plovdiv—26);

II grado — 2 grupoj kun 23 gekursanoj (Sofio—10, Ŝumen—13);

III grado — 4 grupoj kun 44 gekursanoj (Sofio—12, Ŝumen—11, Veliko Tarnovo—12, Sliven—9).

Gvidantoj de la grupoj:

I grado: Ivan Canev (Sofio), Canko Murgin (Ŝumen), Dimitr Canev (Targoviŝte kaj Popovo), Ĥristo Dolĉinkov (V. Tarnovo), Maria Angelova (Plovdiv);

II grado: Kunĉo Vălev (Sofio), C. Murgin (Ŝumen);

III grado: K. Vălev (Sofio), C. Murgin (Ŝumen), Ĥr. Dolĉinkov (V. Tarnovo) kaj Jordan Angelov (Sliven).

La rezultoj estas bonaj. Ĉiuj regulaj kursanoj kontentige progresis en siaj grupoj. La forestaj kursoj fakte estas miksitaj: dum la monato oni lernas foreste en sia loĝloko laŭ donita plano, preparante du kontrolekzercojn kaj unu fojon en la monato ĉiuj kolektiĝas por ĉeesta okupo sub la gvido de sia kursestro. Tiu instruformo montriĝis tre konvena por la instruistoj, ĉar la kursanoj povas lerni sen deflankiĝo de sia lerneja laboro.

Nun staras la grava tasko: organizi bone — pli bone ol en la pasintaj du jaroj! — la somerajn kursojn. Kiel jam estas anoncote, unuafoje ili okazos ĉe la maro, apud urbo Burgas. Estas dezirinde, ke ĉiuj ĉi-jaraj forestuloj nepre aliĝu al la someraj kursoj por daŭre perfertigi sin lingve en pure esperantista medio. Tio validas ankaŭ por la pasintjaraj gekursanoj — ili ankaŭ devas plialtigi sian lingvoposedon en la someraj kursoj.

(Sekvas sur p. 10)

TRADICIA PRINTEMPA E-BALO EN MADAN

La 20-an de marto ĉi-jare en restoracio „Kristal“ (urbo Madan) okazis la tradicia printempa Esperanto-balo. Partoprenis ĝin pli ol 100 ĝesperantistoj kaj amikoj de Esperanto el diversaj urboj el Smoljan-distrikto.

Enirinte la restoracion ĉiu estis ravita de la printempa ornamaĵo kaj allogaj sloganoj.

Post la agrabla vespermanĝo la scenejon supreniris Georgi Vasilevski, lektoro de Esperanto en Madan, kiu en bonega lingvo salutis la ĉeestantojn. La parolon oni donis ankaŭ al Nikolaj Bojaĝiev el Plovdiv, kiu en la nomo de BEJ bondeziris al la esperantistoj de Madan ankoraŭ pli grandajn sukcesojn en ilia laboro rilate al lernado kaj disvastigado de nia kara lingvo Esperanto.

La restoracia orkestro baldaŭ sukcesis igi ĉiujn danci. Kiam la dancantoj estis jam lacaj, sur la scenejo aperis speciale vestita junpionira grupo, lernanta Esperanton en kvartalo „Batanci“ kun gvidantoj Marija kaj Dimitr Ŝtojanov. Per siaj bonege plenumitaj E-kantoj kaj deklamaĵoj la lernantoj sukcesis plenigi per kontento la korojn de la ĉeestantoj.


Tre interesaj estis la japana tombolo, la E-„viktorigo“ kaj la diversaj amuzludoj. Post noktomezo la orkestro de Smoljan kun gvidanto Plamen Vodenĉarov ludis en daŭro de kelkaj horoj. La violonon de Plamen kaj precipe lian arton ni ofte rememoros. . .

Specialan dankon meritas la prezidanto de la societo „Bjalistok“ en Madan, Georgi Ĥarizanov, Mustafa Mustafov, Georgi Vasilevski, Georgi Kriminalov, Ivan Karaminev, Maria kaj Dimitr Ŝtojanov, samkiel ĉiuj ĝesperantistoj de la urbo, kiuj helpis la organizadon de tiu ĉi neforgesebla festo — la printempa Esperanto-balo.

Nikolaj Bojaĝiev

La junpioniroj en kv. „Batanci“ kun siaj gvidantoj





La 3-grada E-kurso en Sofio dum leciono

Krome, ĉe la maro oni kunigos la lernadon kun la agrabla ĉemara ripozado (sunbanado, marbanado, promenadoj ktp).

Jam nun oni devas pensi ankaŭ pri la forestaj kursoj dum la sekvonta lernojararo. La distrik-taj komitatoj, la societaj estraroj, ĉiuj aktivu-loj de nia E-movado devas agiti inter la inst-ruistoj pri la kursoj, obstine konvinki kaj varbi novajn gekursanojn. En tiu agado nin gvidos la granda celo: altiri la instruistaron al nia Movado kaj tiamaniere gajni fortajn poziciojn por Esperanto en la lernejoj — sekve inter la juna generacio.

K. Vălev

Internacia pedagogia revuo IPR abonebla ĉe ni!

Kun ĝojo ni komunikas, ke Internacia Pedagogia Revuo, oficiala organo de Internacia Ligo de Esperantistoj — Instruistoj (ILEI) jam estas abonebla en nia lando. La revuo estas tre utila kaj necesa por la instruistoj de Esperanto en lernejoj kaj por kursgvidantoj ĉe E-societoj. Ĝi donas riĉan metodikan materialon pri E-instruado kaj informojn pri la E-movado inter instruistoj en la tuta mondo.

Jam aperis la prov- kaj 1-a numeroj, kiujn vi povas ricevi tuj post pago de la abonkotizo.

La abonkotizon de 3 levoj sendu per poŝtmandato al la sekretario de la Instruista Sekcio de BEA k-do Jordan Markov, str. Kr. Sarafova 29, Sofio 21.

E-kurso en Svoge

Finigis sukcese unuagrada Esperanto-kurso ĉe Popola Legejo „Dimitr Blagoev“ en la monta urbo Svoge, distrikto de Sofio. La kurson gvidis Jordan Atanasov, instruisto en fundamenta lernejo „Mitko Palauzov“ en la sama urbo. Dek el la novaj esperantistoj fariĝis abonantoj de „Bulgara Esperantisto“, dek — membroj de Bulgara Esperantista Kooperativo.

Nia aktiva s-ano Atanasov gvidas ankaŭ kurson por lernantoj en lernejo „M. Palauzov“.

Prepariĝas favoraj kondiĉoj por fondo de Esperanto-societo en Svoge.



*La E-kurso en Svoge kun sia gvidanto
J. Atanasov*

Forpasis en Varna en sia 68-jara aĝo nia samideano

ALEKSANDR FILIPOV

Li estis multjara fidela membro de E-societo „Albatro“

NIAJN KONDOLENCOJN!



La membro de la Redakta Komitato de nia revuo VENELIN MITEV, kiu nun estas korespondanto de la Bulgara Telegrafinforma Agentejo (BTA) en Moskvo, renkontiĝis kun elstaraj agantoj de la Esperanto-movado en Sovetunio kaj konversaciis kun ili pri iuj plej aktualaj problemoj de la originala kaj tradukata Esperanto-literaturo.

En kelkaj sinsekvaj numeroj de nia revuo ni publikigos iujn el tiuj konversacioj, kiuj laŭ ni prezentos intereson ne nur por specialistoj, sed ankaŭ por la pli vasta legantaro. Eble tiuj

1. Kion vi opinias pri la nuntempa stato de la originala E-literaturo?

— Ĝi ekzistas, sed estas ankoraŭ modesta laŭ kvanto kaj kvalito. Vere, troviĝas kelkaj elstaraj verkoj, kiel tiuj de Baghy, Forge, R. Schwarz (ŝvarc), vojaĝlibroj de T. Sekelj, Pribillard kaj eble ankoraŭ iuj, kiujn mi ne konas. Mi ne notas poemplibrojn, kiuj abundas kaj estas mezkvalitaj. La plej elstara poemplibro estas la „Ezopa saĝo“ de Kaloczay (Kaloĉaj). Gravaj estas ankaŭ la dramoj de G. Mattos.

Por pli bona evoluo de la originala literaturo mankas kondiĉoj: a) legantaro, b) merkato. La nuntempaj milekzempleraj eldonkvantoj ne ebligas pagi al la aŭtoroj honorarojn, kiuj estas grava instigo al verkado. Pro valutaj kaŭzoj la merkato estas tiom limigita, ke fakte la legantaro en socialismaj landoj prezentas nur la esperantistoj de tiu lando, kiu eldonis la libron. En tiuj malfavoraj kondiĉoj mi ne vidas eblecojn por konsiderinda progreso en la afero.

2. Kaj kion vi opinias pri la tradukata literaturo?

— En Esperanto estas eldonitaj dekoj da altvaloraj verkoj de la monda literaturo. Mi opinias, ke mi ilin konas kaj multajn ankaŭ persone havas. Nomi ilin ĉi tie postulas multe da tempo kaj spaco.

3. De kiuj tradukistoj?

— Al mi plaĉas tiuj tradukistoj, kiuj, per simpla Esperanto kapablas traduki elstarajn verkojn. Kaj al mi ne plaĉas tradukistoj, elpensantaj novajn vortojn, kiujn mi ne komprenas eĉ tiam, kiam oni ilin klarigis en glosoj. Sed vi ne komprenu min kiel kontraŭulon de ĉiuj novaj vortoj. La lingvo devas evolui kaj pliriĉiĝi per novaj vortoj, sed tiuj vortoj devas esti vere necesaj kaj ĝis nun mankantaj en la lingvo.

4. Ĉu la originala literaturo en Esperanto laŭ via opinio havas specifikaĵojn?

konversacioj fariĝos bona komenco de pli longdaŭra kaj detala interparolo pri tiu eksterordinare grava problemoj kaj estos sekvitaj de utilaj praktikaj paŝoj.

Ĉi-sube ni publikigas la konversacion kun la elstara estona esperantisto JAN OJALO, esperantisto de 1929. Li tradukis kaj publikigis en „Norda Prismo“ plurajn verkojn el la estona literaturo. Ojalo estas aŭtoro de lernolibro, jam preta por presado, organizanto kaj gvidanto de E-kursoj.

— La literaturo estas arto, al kies kreantoj oni ne povas antaŭskribi regulojn. Tion oni kelkfoje provis fari, sed malsukcese. Ĉiam troviĝas grandaj verkistoj, kreantaj artverkojn, kiuj ankaŭ ne konsideras la preskribojn. La praktiko montras, ke en la Internacia Lingvo oni povas verki sen konkreta nacia adreso, sed ankaŭ tute naciajn verkojn. Komparu ekzemple Forge, kies verkoj estas sen konkreta nacia adreso, kaj H. Adamson, kies verkoj estas pure estonaj.

Mi ne imagas, ke en Esperanto oni povas krei verkojn, kies ideoj kontraŭas la ideojn de esperantismo.

5. Kiajn verkojn traduki?

— Unue — verkojn por la nuntempa homo t. e. el la nuntempa literaturo. Sed, due ankaŭ elstarajn verkojn el la klasika literaturo, kies valoro ankoraŭ daŭras ĉu el arta vidpunkto, ĉu el historia vidpunkto aŭ alikajle. Certe ĉiu nacia literaturo havas siajn elstarajn verkojn, kiuj valoras esperantigon.

6. Prozon aŭ poezion?

— Ambaŭ estas necesaj. Nuntempe iuokaze superas poezio, sed la plimulto de la legantaro ŝatas prozon.

7. Kion vi opinias pri la porinfana literaturo en Esperanto? Kiaj estas ĝiaj specifikaĵoj?

— Laŭ mia opinio originala porinfana literaturo en Esperanto mankas aŭ preskaŭ mankas. En la nuna etapo de la Movado ĝi estas ege necesa, ĉar jam konsiderinda nombro da geinfanoj okupas sin pri la lingvo. Specifikaĵoj? — Ĝi devas esti bone ilustrita, havi nekomplikan idearon kaj edukajn tendencojn. La vorttrezoro devas esti limigita.

8. Konigu, mi petas, vian opinion pri la eldonado de belarta literaturo en Esperanto.

— Jes, mi volus kapti kaj uzi la eblecon pli vaste kaj pli praktike. Kaj pro tio mi ankaŭ deziras transiri al tute praktika flanko de la sama afero.

Kia estas la problemo?

En okcidentaj landoj la Movado stagnas, kvankam estas konsiderinda aktiveco en la eldona laboro. Oni eldonas sufiĉe multajn librojn en malgrandaj eldonkvantoj, sed ankaŭ tiuj restas sur la bretoj de la vendolokoj. Multajn el tiuj eldonitaj libroj ankaŭ ni en la socialismaj landoj volonte aĉetus kiel taŭgajn en niaj kondiĉoj, sed pro la valutaj kaŭzoj tio ne estas ebla.

En niaj socialismaj landoj, kie Esperanto disvastiĝas multe pli aktive, mankas literaturo krom kelkaj lernolibroj kaj vortaroj. Homoj lernintaj la lingvon ne povas apliki la lerniton pro manko de literaturo. Aŭ en pli bona okazo ili povas aĉeti la literaturon tradukitan el sia gepatra lingvo (en Bulgario — la verkojn de Vazov, Karaslavov kaj kelkajn aliajn, en Pollando — de Prus kaj Sienkiewicz, en Hungario — de Santa kaj Madach). Ankaŭ tiuj eldonaĵoj ne elĉerpigas, ĉar esperantistoj de aliaj socialismaj landoj ilin ne povas aĉeti pro manko de koncerna mono. Sed kiam la antaŭaj eldonaĵoj ne estas venditaj, oni ne presas novajn. Rezulte de tio stagnas la afero ankaŭ ĉe ni: kial do lerni lingvon, se oni ne povas ĝin apliki en praktiko?

Ĉu troviĝas eliro el la sorĉa cirklo? Eliro taŭga por la cirkonstancoj de niaj landoj? ...

Laŭ mia opinio la eliro troviĝas en reciproka interhelpo, en senmona interŝanĝo de literaturo kontraŭ literaturo.

Niaj esperantistaj organizaĵoj en Bulgario, Hungario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Pollando kaj Sovetio devas kontrakti pri la jeno: ĉiu lando eldonas dum la jaro Esperantajn librojn je la valoro ekzemple de 50 kopekoj — tio signifas proksimume 100 paĝojn. Ĉar la mono estas diversvalora kaj la prezoj de la literaturo ankaŭ malegalaj, la unuo de kalkulado povas esti nur natura, t. e. **paĝo**. Ekzemple, ni, la sovetaj esperantistoj, eldonas venontjare 100 paĝojn da esperantlingva beletra literaturo kun eldonkvanto de ekzemple 5000 ekzempleroj, ĉar pli malgrandan eldonkvanton la ŝtataj eldonejoj apenaŭ agnoskos. El tiu kvanto ni, la sovetaj esperantistoj, elaĉetos mil ekzemplerojn kaj sendos ilin al Bulgario. Sed samtempe la bulgaraj esperantistoj ankaŭ eldonos 100 paĝojn en 5000 ekzempleroj. Ankaŭ ili elaĉetos de la librokomerca kontoro mil ekzemplerojn kaj sendos kompenso al la sovetaj esperantistoj. Forvendi mil ekzemple-

rojn — tio ne estas granda kaj malfacila tasko en kiu ajn lando. Tia sama operacio povas okazĝi ankaŭ inter hungaraj kaj sovetaj esperantistoj, inter hungaraj kaj bulgaraj, hungaraj kaj ĉeĥoslovakaj ktp.

9. Kion tio postulas de ni?

— En Sovetunio pli grandaj esperantistaj grupoj, interesigantaj pri la afero, troviĝas en ĉirkaŭ 20 lokoj. Tio signifas, ke en tiuj 20 lokoj devas esti iu agadkapitalo. Kiom granda ĝi devas esti? Se ni konsideras, ke 100-paĝa libro kostas 50 kopekojn, oni povas fari la unuan operacion per 25 rubloj, ĉar ĉiu loko ricevos 50 ekzemplerojn. Se ni konsideras, ke ĉiuj 5 aŭ 6 landoj eldonos literaturon kaj aliĝos al la afero, do la kapitalo en ĉiu loko devas esti 5-oble pli granda, t. e. 100—150 rubloj. Mi opinias, ke ne estas fantazia aŭ utopia afero kolekti tian sumon en ĉiu loko, kie organiziĝis kelkdekoj da esperantistoj. Sed en Bulgario, kie jam ekzistas Esperantista Kooperativo, tio estas ebla eĉ sen kolekto de tia agadkapitalo.

10. Kia estos la rezulto?

— Eldonkvantoj de niaj libroj estos forvenditaj se ne dum unu jaro, almenaŭ dum du. La homoj, kiuj lernis la Internacian Lingvon, ricevos legajon. Ili ne plu restos kiel en dezerto, ĉar ni konatiĝos reciproke, pliprofundiĝos niaj amikaj rilatoj. Gravaj servon ni faros ankaŭ al niaj socialisman landoj, al niaj naciaj literaturoj.

11. Kiaj libroj estu eldonataj?

— Mi opinias, ke ni ne kaptu komence la plej grandajn kaj elstarajn klasikajn verkojn de niaj literaturoj, sed trovu malgrandajn, altvalorajn verketojn kun amplekso de ekzemple ne pli ol 100 paĝoj. Pli bone estus eĉ, se oni eldonus kelkajn diversenhavajn kaj diversfakajn librojn: prozon, poezion, porinfanan libreton ktp.

Mi ankaŭ opinias, ke ni — sovetianoj kaj bulgaroj — povus esti la iniciatantoj de tiu afero, ĉar en nia lando nun jam en kelkaj respublikoj troviĝas eldoneblecoj kaj oni preparas eldonotajn librojn. En Bulgario ja ĉio jam ekzistas, eĉ pretaj libroj.

*

Noto de la Redakcio. Ni invitas ankaŭ aliajn samideanojn esprimi sian opinion pri la supre starigitaj problemoj.

Eĉ nun vi povus aboni „Bulgaran Esperantiston“! Vi ricevos ĉiujn aperintajn numerojn. Sumojn sendu al adreso:

Български есперантски съюз, с-ка 19/1052, ДСК Благоевски район, София.



EL LA AGADO DE LA ESPERANTISTOJ EN TROJAN

Nia E-Societo „Balkana stelo“ tre bone kaj solene festis la Semajnon de Internacia Amikeco. Estis eldonitaj kovertoj kaj poŝtkartoj kun E-sloganoj kaj la emblemo de la Semajno. Ni organizis kunvenon, kiun ĉeestis 80 esperantistoj kaj amikoj de Esperanto.

Nia junulara grupo partoprenis la X-an Junularan Festivalon de BEJ en Jambol kun programo.

La E-lernojaro finiĝis per solena kunveno. La kurson por komencantoj finis 22 civitanoj kaj por progresintoj — 15. Post arta programo fare de la gekursanoj estis disdonitaj atestoj. La kursgvidanto Ivan Liŝev dankis al la kursanoj pro ilia diligenta lernado kaj pro la bondeziroj, kiujn ili direktis al li.

La fonduso „Propra Esperanto-Klubejo“ jam superas 2 000 levojn. Nun ni aranĝas tombolon kun planita gajno de 300 levoj por la fonduso.

Trojana esperantisto



La naŭjara esperantistino Bojanka Kisjova el Trojan plenumas „Unuan kanton de Esperanto“ (teksto kaj muziko de Ivan Ŝaĥariev) en la Festivalo en Jambol. Ŝi ricevis II premion.



La plej malgranda esperantistino el Trojan Pepa Mitovska plenumas la kanton „Paŝtisteto“ de Ivan Vazov en la Festivalo en Jambol. Ŝi ricevis II premion.

„Unu peno de amikeco en la senlima spaco de la spirito“

Sub la supra titolo aperis tutpaĝa artikolo en la grandformata meksika gazeto „Novedades“, pritraktanta la agadon de l'junaj meksikaj esperantistoj. Speciala ĵurnalisto de la populara taggazeto vizitis la sidejon de la Esperantista Meksika Junularo kaj intervjuis ties gvidantojn. La longa artikolo kun kelkaj fotoj abundas je ĝisdataj kaj trafaj informoj pri Esperanto kaj pri la agado de la meksikaj esperantistoj. La intervjuo grave helpis la preparlaborojn por koresponda kurso de Esperanto, kiun la meksika junularo ĵus lanĉis.

EL SOVETUNIO

La Esperanto-mondo en Moskvo kaj en la tuta Sovetlando konstante progresas. En multaj urboj reviviĝis la aktiveco de apartaj samideanoj, precipe tio estas rimarkebla en apudbaltaj regionoj (Estonio, Litovio, Latvio kaj Kaliningrada Regiono). En Estonio aperis bona esperantlingva broŝuro „Soveta Estonio“, jam plene disvendita. Litovaj gesamideanoj aperigis enhavoriĉan kajeron „Horizonto de Soveta Litovio“, kiun oni sendis al ĉiuj esperantistaj revuoj. Niaj latvaj samideanoj aktive pretigas sin por la okazonta ĉi-somere XIII-a BET (Balta E-Tendaro) de la 6 ĝis la 15 de aŭgusto en la pitoreska loko Smiltene en Norda Latvio. Ne malpli grandan sukceson oni vidas ankaŭ en Ukrainio, kie estas aperigita bona etnografia broŝuro „Ukraina Soveta Socialisma Respubliko“ en traduko de S. Mizeruĥa. Ankaŭ tie estas regule eldonata riĉenhava revuo „Tra Soveta Ukrainio“.

Sed la ĉefurbo Moskvo sendube okupas la unuan lokon. Jen estas mallonga skizo pri la trimonata agado de la Moskva Internacia Esperanto Klubo (MIEK):

Malnovgrekaj elementoj en Esperanto

La 7. II. 71 en MIEK okazis „Libera Tribuno“, dum kiu prof. E. A. Bokarev faris erudician prelegon pri malnovgrekaj elementoj en Esperanto.

La Klubon vizitis la bulgara esperantisto Venelin Mitev, kiu rakontis pri la sukcesa laboro de la Bulgara Esperantista Asocio kaj de la Sofia E-Societo „Maksim Gorkij“.

K-do Abdurahman Junusov, juna studento-esperantisto el Maĥaĉkala (Dagestano), rakontis pri la aktiva agado de la Klubo „Guto“ kaj pri la aktiva laboro de esperantista brigado por restarigo de la detruoj, kaŭzitaj de la tertremo en ilia regiono. Tiu fakto multe impresis la lokan komitaton de VLKSM (Komsomolo), kiu de tiam aktive helpas al esperantistaj entreprenoj.

Diskutindaj problemoj en la Esperanta gramatiko

La 14. II. 71 en MIEK okazis metodika seminario, dum kiu k-do A. B. Zisman raportis pri diskutindaj problemoj en la E-gramatiko, precipe pri la prepozicio **DE**, kiu en diversaj okazoj havas diferencon sencon. Li donis multe da ekzemploj kaj montris rimedojn simpligi la komplikajn frazojn.

La kunvenon varme salutis k-do Ĉoj Lub-sanĵav — katedroestro de fremdaj lingvoj en la Mongola Ŝtata Universitato (en Ulan-Bator,

Mongolio) — kaj rakontis pri la tiea E-movado. K-do A. N. Bohdanov, kuracisto el Kiev, salutis la ĉeestantojn kaj sciigis pri diversflanka agado de kievaj esperantistoj kaj pri la okazonta apud Kiev (26 de julio ĝis 7 de aŭgusto) junulara E-tendaro.

Memorinda dato de la Soveta Armeo - defendanto de la paco

La 21. II. 71 MIEK aranĝis vesperon, dediĉitan al la 53-a jubileo de la Soveta Armeo. Ĝin malfermis per mallonga parolado k-do S. N. Krajnov kaj donis la parolon al k-ino L. V. Saltikova. Ŝi partoprenis en la Dua Mondmilito kiel kaŝesploristino, kiu gratulis la ĉeestantojn pri la glora jubileo de la Soveta Armeo kaj rakontis interesajn epizodojn el la pasinta mondmilito.

Rolo de la virinoj en la Zamenhofa familio

La plej interesa vespero en MIEK okazis la 28. II. 71. Ĝi estis dediĉita al la Internacia Virintago. La kunvenon malfermis k-ino V. P. Ostroĵnikova kaj invitis en la prezidantaron k-inojn N. D. Sulje, L. V. Saltikova, L. V. Erjuĥina, N. V. Kopina. La podio estis ornamita per E-standardo kaj E-emblemo. Antaŭ la komenco de l'oficiala parto oni komune fotiĝis. La festan prelegon faris k-ino Sulje—prezidantino de la virina fako de Soveta MEM-Sekcio. Ŝi rakontis pri la rolo de la virinoj en la Zamenhofa familio, menciinte multajn trajtojn el la biografio de la Majstro.

Per koraj salutoj kaj varmaj bondeziroj al la virinoj-esperantistinoj sin turnis: Saltikova, Lavrentjev kaj Salnikov. K-ino E. P. Ostroĵnikova voĉlegis versajn salutojn de la E-poetoj A. Logvin kaj K. Gusev.

Funebra vespero pro la forpaso de prof. E. A. Bokarev kaj 100-jara jubileo de la pariza Komuno

La 14. III. 71 en MIEK okazis funebra vespero, dediĉita al la memoro de forpasinta je 11. III. 71 honora membro de MIEK prof. E. A. Bokarev. Sur la podio estis pupitro kun granda portreto de Bokarev en funebra kadro kun mallonga nekrologo kaj dediĉita al li versaĵo de A. Logvin. La tristan sciigon pri la morto de Bokarev faris la prezidanto de MIEK k-do E. T. Salnikov. Pri la meritoj de la forpasinto parolis Kulagin, Ŝumilov, Vengerov, prof. Armand, Lubsanĵav (Mongolio), Samodaj, Palkin, Tokarev, Jaskov kaj Aroloviĉ.

Post negranda interrompo k-do E. T. Salnikov rakontis pri la Pariza Komunumo, kies 100-jaran jubileon oni nun honoras.



Pri la historio de la E-movado en Sovetunio kaj pri la E-agado de la veterano el Miĉurinsk A. D. Borisoglebskij rakontis k-do Kraĵnov S. N.

K-do Jaskov el Barnaul rakontis pri la E-movado en Altaĵa Regiono kaj pri la organizo de internacia ekspozicio de infanaj desegnaĵoj kaj bildoj, kolektitaj el diversaj landoj per Esperanto. Post Barnaul la ekspozicio, enhavanta 800 desegnaĵojn, estis eksponita en la siberiaj urboj Novokuzneck, Meĵdureĉensk, Tomsk, Novosibirsk. Nun ĝi sukcese funkcias en Omsk. Pri tio estis farita komuniko kun mencio pri Esperanto la 28. II. 1971 en disaŭdigo de Radio Moskvo.

K-ino G. A. Belenjuk el Soĉi koncize rakontis pri la E-movado en la apudnigramara ripozurbo Soĉi. Poste ŝi rakontis pri siaj interesaj impresoj pri Egiptio, de kie ŝi ĵus revenis.

Fine de la kunveno nia veterano P. N. Ŝumilov speciale por la gejunuloj rakontis pri la brua E-movado de la sovetaj esperantistoj en la dudekaj jaroj, pri kortuŝaj renkontiĝoj kun eksterlandanoj (el Norvegio kaj Bulgario).

Funebra mitingo kaj lasta adiaŭo al prof. E. A. Bokarev

La 15. III. 71 en la Moskva Instituto de Rusa Lingvo okazis funebra adiaŭo kun la forpasinta prof. E. A. Bokarev, kiun ĉeestis multaj liaj kunlaborantoj kaj samideanoj de Moskvo. En la mezo de granda halo en ruĝa ĉerko, dronanta en floroj, kuŝis la mortinto. Ĉirkaŭe staris multaj florkronoj, ornamitaj per ruĝaj kaj nigraj rubandoj, inter kiuj ankaŭ florkrono de la moskvaj esperantistoj kun verdaj rubandoj kaj konvena esperantlingva surskribo. Sonis mallaŭte melodio de funebra muziko. En plena silento ambaŭflanke de la ĉerko staris po 4 personoj dum 5 minutoj en honora gardo, inter kiuj ankaŭ moskvaj samideanoj. Dum la funebra mitingo parolis multaj personoj, konintaj la profesoron. Esperantistoj emfazis la sciencajn kaj Esperantajn meritojn de la forpasinto. Post la mitingo per funebra aŭtobuso kun eskorto de akompanantoj oni transportis la ĉerkon por kremacio.

Tago de internacia teatro

La 21. III. 71 en MIEK okazis vespero, dediĉita al la Internacia Teatro, dum kiu k-do A. S. Ĥarĵkovskij rakontis pri luditaj Esperantaj teatraĵoj, komencante per la Unua Universala Kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-mer kie oni prezentis „Revizoron“ de Gogol en traduko de d-ro Zamenhof, kaj finante per „Cimo“ de Majakovskij, kiun montris esperantlingve moskvaj studentoj en 1966 en Hungario kaj Pollando.

Poste okazis koncerto, kiun partoprenis profesiaj artistoj el „Moskoncert“ — Leonid Borodin kun pianakompano de Igorj Guselnikov;

ili donis fragmentojn el koncerta programo sub la nomo „Mi kredas, esperas kaj amas“.

La Teatro de Deklamantoj ĉe la Centra Kulturdomo de Medicinistoj arte tralegis en du partoj la biografion de la fama artisto kaj reĝisoro K. S. Stanislavskij laŭ lia verko „Mia vivo en la arto“.

La vesperon ĉeestis pli ol 200 personoj.

Grandaj eventoj de nia epoko

La 28. III. 71 pri la plej gravaj problemoj, kiuj staras antaŭ nia lando laŭ la Direktivoj de KPSU, akceptitaj de ĝia XXIV Kongreso, skize raportis k-do N. F. Danovskij.

Pri siaj spertoj en la E-movado raportis veterano P. N. Ŝumilov.

Pri la internacia signifo de niaj kvinjaraj planoj parolis ing. F. J. Kulagin.

K-do N. F. Danovskij informis la ĉeestantojn pri la forpaso (la 3-an de marto 1971) de k-do E. P. Svadost, la aŭtoro de filozofia libro „Kiel ekestos la tutmonda lingvo“, pri kiu oni multe diskutis en la Esperantaj rondoj.

K-ino N. D. Sulje legis artikolon pri la forpasinta prof. E. A. Bokarev.

Kompilis: Teodoro KULAGIN

LA TAGLIBRO DE TANEEV*

En apudmoskva vilaĝo Djutkovo troviĝas muzeo, dediĉita al la memoro pri la granda rusa komponisto Sergej Taneev. Inter la ekspoziciaĵoj troviĝas ankaŭ la taglibro de Taneev. Laŭsupoze ĝi estis skribita ĉu en itala, ĉu en hispana lingvo. Sed liaj biografiaj ne mencias, ke la komponisto libere scipovis almenaŭ unu el tiuj ĉi lingvoj. Kaj skribado de taglibro ja estas ebla nur en lingvo, scipovata same bone, kiel la gepatra.

La enigmon divenis la moskvaj esperantistoj: la plej intimajn siajn pensojn la granda komponisto esprimis en la tiam ankoraŭ juna Internacia Lingvo Esperanto.

... La mezo de la 90-aj jaroj de la XIX jarcento. Nur kelkaj jaroj pasis post la tempo, kiam la juna varsovia lingvisto d-ro L. L. Zamenhof kreis Esperanton. Li dissendas al eminentaj agantoj de la monda kulturo sian lernolibron. „Konsideru min ne aŭtoro, sed nur la

* *Sergej Taneev (1856-1915) — elstara rusa komponisto, muziksciencisto, pedagogo, pianisto kaj muzik-socia aganto. Li edukis generacion de elstaraj muzikistoj, kiel: Skrjabin, Rahmaninov, Ljapunov, Pališvili, Metner, Sac, Javorskij, Vasilenko, Glier, Aleksandrov k. a.*

iniciatinto de la Internacia Lingvo. Ĉu vi konsentus ĝin ellerni, se ĝin ekposedus vastaj amasoj?" — demandis Zamenhof.

Unu el la unuaj al ĉi tiu alvoko respondis Lev Tolstoj. Nur kelkajn horojn li bezonis por legi en la Internacia Lingvo. Baldaŭ li estis elektita gvidanto de la Peterburga Esperantista Societo „Espero“.

Ni ne scias, ĉu Sergej Taneev korespondis kun Zamenhof. Ni ne scias, de kiu li aŭdis pri Esperanto. Eble kun tiu ĉi lingvo lin konatigis iu el la amikoj de Tolstoj. Aŭ eble, tute kontraŭe — Lev Tolstoj mem eksciis pri Esperanto de Taneev kaj sub lia influo fariĝis varma adepto de la Internacia Lingvo. Io estas certa: Taneev ekamis la novan lingvon, konfidis al ĝi plej intimajn siajn pensojn, korespondis en Esperanto kun la frato de P. I. Ĉajkovski — Modest.

La entuziasmon de la granda komponisto pri l'Internacia Lingvo ni ne povas kompreni sen la progresema rolo, kiun jam tiam ludis Esperanto. En tiu ĉi lingvo en Eŭropo kaj Ruslando estis presataj revoluciemaj verkoj, inter ili ankaŭ la malpermesitaj de la cara cenzuro ribelemaj artikoloj de Lev Tolstoj. Nur post kelkaj jaroj, rekonsciiginte, la caraj satrapoj malpermesis la disvastigon de similaj Esperanto-eldonaĵoj en Ruslando.

Kuraĝigante la adeptojn de l'Internacia Lingvo, Tolstoj skribis: „... Tiel malmulte da peno eluzas la homo por ellerni tiun ĉi lingvon, kaj tiel grandaj estas la avantaĝoj, eblistaj per Esperanto, ke ĉiuj el ni devas konatiĝi kun tiu ĉi elstara rimedo por ligoj inter la popoloj.“

Tio okazis en 1895 - ok jarojn post la apero de la unua lernolibro de Zamenhof. Tiutempe Taneev jam skribis sian taglibron.

Antaŭ kelkaj jaroj en la tombejo Novodeviĉje en Moskvo estis inaŭgurita monumento de Sergej Taneev. La Ŝtata Kapelo sub la gvido de A. Sveŝnikov plenumis la verkon de la granda komponisto „La vespero“. La saman tagon en la Moskva Internacia Esperanto-Klubo okazis kunveno dediĉita al Taneev — unu el la unuaj esperantistoj. Tiel la sovetaj esperantistoj omaĝis la memoron de la granda komponisto, parolinta al la homoj en du internaciaj lingvoj — en la lingvo de l'muziko kaj en Esperanto.

A. Harkovskij

El la rubriko „En la lingvo de amikeco — Esperanto“, f. „Soveta Junularo“ — organo de CK de Komsomolo en Letonio, n-ro 228/1970.

POR LA MALGRANDA ESPERANTISTO

KOLOMBO BLANKA

de Ivan Genov

**Kolombo blanka,
kie vi flugis,
kie vi flugis,
kion vi vidis?**

**Aŭdu, knabeto,
kara frateto,
ĉie mi flugis
en nia lando.**

**Kie mi flugis,
tion mi aŭdis:
ĉie la homoj
pacon deziras.**

El bulgara: Zefira Dimitrova

Baleno — kantisto

Antaŭ nelonge zoologoj malkovris, ke iuj specoj de balenoj . . . povas kanti — almenaŭ iliaj blekoj povas esti komparataj nur kun la kantoj.

Iu el la plej bonaj kantistoj estas la granda (ĝiba) baleno, longa ĉirkaŭ 15 metrojn. Laŭstile ĝia kanto similas al kanto de birdo, sed ĝi estas kun tre mallaŭta tonalteco kaj ne daŭras pli ol 15 minutojn. Krome, ĝi konsistas el komplikaj serioj de infra- kaj ultrasonaj frekvencoj, samkiel el sonoj percepteblaj de la homa orelo.

La sciencistoj jam kelkajn jarojn okupas sin pri la kantantaj balenoj. Ili interesiĝas pri la maniero, laŭ kiu la subakvaj bestoj ligiĝas inter si. La esploroj kondukas al interesa akcesora malkovro: en certaj oceanaj tavoloj, konataj, kiel sonkanaloj, la kantoj de la baleno povas disvastiĝi je miloj da kilometroj sen konsiderinde malfortigi sian forton.

Oni ne scias, kiamaniere la balenoj, nehavantaj voĉkordojn, povas krei siajn voĉkantojn. Ne estas konata ankaŭ ilia destino. Plej verŝajne tiuj kantoj estas siaspeca parola vizitkarto, montranta la ĉeeston de baleno.

Kontinentoj malproksimiĝas

La distanco inter Eŭropo kaj Afriko pligrandiĝas ĉiujn 100 jarojn per ses-sep metroj. Oni opinias, ke tiu malproksimiĝo de la kontinentoj daŭras jam kelkcent milionojn da jaroj.

Kompilis: Evgenij Georgiev,
lernanto — Sofio



En ĵ. „Trojanski glas“ (6. I. 1971): artikolo de Vasil Mitovski — „Esperanto, paco kaj amikeco“.

En la sama ĵurnalo (10. II. 1971): artikolo de Coço Kolarov „Kio unuigas tiujn ĉi homojn?“ — interesa materialo pri la internacia korespondado.

En ĵ. „Ŝumenska Zarja“ (4. II. 1971): artikolo de Cvjatko Todorov „Leteroj, plenaj de amo kaj estimo“ — pri la korespondado de la esperantistoj kun GDR, Belgio, Francio, Finnlando, Brazilo, Japanio, USSR k. a.

En ĵ. „Ustrem“ — Svoge (15. II. 1971): artikolo de Elena Radenkova „Unu utila iniciato“ — pri E-kurso en Svoge.

En ĵ. „Rabotničesko delo“ (21. II. 1971): artikolo de Nano Nanov „Semajno de Internacia Amikeco“.

En la sama ĵurnalo (3. III. 1971): informo „Por paco kaj amikeco inter la popoloj“ — pri la granda kunveno organizita en Sofio de la Urba Komitato por Defendo de la Paco, la Bulgara Sekcio de MEM kaj la DK de BEA kun oratoroj Georgi Pirinski kaj Nikola Aleksiev.

En ĵ. „Dimitrovgradska Pravda“ (25. II. 1971): artikolo de Jeko Zaprianov „La esperantistoj kaj la amikeco“ (okaze de la Semajno de Internacia Amikeco).

En ĵ. „Dunavska Pravda“ — Ruse (27. II. 1971): artikolo de Geto Dobrev „Semajno de Internacia Amikeco“.

En ĵ. „Ĉernomorski Front“ — Burgas (27. II. 1971) artikolo de Kaljo Bjandov, prezidanto de DK de BEA en Burgas, dediĉita al la Semajno de Internacia Amikeco, titolita, „Demokratia, pacama kaj internacia movado“. La artikolo estas tre interesa kaj en ĝi abundas multaj faktoj pri la E-movado.

En ĵ. „Zarja na Komunizma“ — Loveĉ (6. III. 1971): publikita letero de Nguen Thi Thom, malliberulino el Sajgono, adresita al al gazeto „Suda Vjetnamio en batalo“ (tradukis el Esperanto A. Matev).

En ĵ. „Septemvri“ — Stara Zagova (19. III. 1971): tre interesa artikolo de Ivan Zahariev „Malantaŭ maroj kaj oceanoj“. La aŭtoro rakontas pri sia ege interesa korespondado kun nederlandano, kanadanino kaj sovetiano kaj deklaras, ke li intencas traduki la Direktivojn de la X Kongreso de BKP por la disvolviĝo de la lando en Esperanton kaj sendi la tradukon al siaj korespondantoj.

Bulgario

Ĵelka Hâševa (12-jara) kaj Neco Hâšev (19-jara) — str. Dimo Stanev 5, Stara Zagora — interŝanĝas pm, bk, gramofondiskojn kun estrada muziko.

Pastro Miĥail Popivanov — Svoge, Sofia-distr. (pri filatelo, speciale pri la temo eminentaj personoj — scienculoj, verkistoj, komponistoj k. a.; interŝanĝas pm).

Nikola Matev — 34 j. instruisto de matematiko, str. Benkovski 3, Belene.

Hungario

Gelernantoj, 16-jaraj, dez. korespondi kun junaj bulgaroj. Komuna adreso: Esperanto-grupo. Turkeve, Sfjusaĝi hár. Jen la nomoj: Acsadi Zoltan, Bedö Magdalino, Heinfart Gizebla, Keleman Maria, Kormos Sanos, Mikola Lajos, Palko Iren, Vegh Laszlo.

Thur Zsuzsa — 19 j. oficistino, dez. kor. kun bulgaroj: Budapest X, Pongrác ut. 17 H/36.

Benjamen Zsoldos — Szentkiralyi u. 6 Budapest VIII — kun ĉi pri diversaj amuziĝoj; interŝanĝas bk.

Edit Bicskei — 10 j. lernantino (bk — kun bulgaraj, sovetaj, polaj, italaj amikinoj), Budapest XIII, Thälmann -u 11.

Sovetunio

Ŝirokorjadov Miĥail — 19-jara. studento, kun ĉi pri ĉi: Belgorod, str. Ŝerŝneva 4-a — 16, Ukrainio.

Ŝilo Larisa — 19-jara, vendistino — kun ĉi pri modernaj kantoj, gramofondiskoj, bk: str. Tankovaja 127—2, Ĥarkov 66, Ukrainio.

Dapkute Vera — 19-jara, lernantino en pedagogia lernejo, K. Manto 41-4, Klaipeda, 235800, Litovio.

Violeta Slatilyte — 17-jara, lernantino, pri muziko, literaturo: Sisuhai Gruzojal vll Jokubniŝiai.

Napeijs Grigas — emerito-lingvisto, Kaunas, Rokai, Litovio.

Vaĥitova Sonja — 22 j. studentino, ul. Pod. vojskogo 21, Ufa 15, 450 015. (literaturo-filmoj) — tre dez. kor kun bulgaraj junulinoj.

Ĉefredaktoro: Kunĉo VÂLEV

Redakta komitato: Bojka BATALSKA, Asen GRIGOROV, Tatjana EVSTRATIEVA, Venelin MITEV, Stefka ĤRISTOVA, Ivan SARAFOV, Simeon D. SIMEONOV.

Korektis: Vasja Petrova

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 83-26-82

„ESPERANTO-RIPOZO INTER AMIKOJ“ „Barikadite-Esperanto“ — monto Sredna Gora, Bulgario



Esperantistoj el ĉiuj landoj, venu al komuna „Esperanto-Ripozo inter amikoj“ en la pitoreska turista objekto „Barikadite-Esperanto“, Bulgario. Tie en trankvilo kaj pura aero, sudlanda arda suno kaj plej agrablaj cirkonstancoj vi povos ripozi inter esperantistoj, fortikigi vian sanon kaj samtempe praktiki la lingvon. Komencantoj povas fari la unuajn paŝojn en la studado de Esperanto.

„Barikadite-Esperanto“ situas en la mezo de monto Sredna Gora, ĉirkaŭ 1500 m super la mara nivelo.

La ripozantoj loĝos en nova trietaĝa moderna **hotelo** kun salonoj por diversaj kulturaranĝoj. La restoracio estas vasta kaj hela. La ĉambroj — 2-litaj kun varma kaj malvarma akvo, apartaj duŝo kaj tualetejo.

Ĉi-lastaj kondiĉoj validas ankaŭ por la komunaj loĝejoj.

Jen la grupoj:

I gr. — 26. VI—7. VII
II gr. — 7. VII—18. VII
III gr. — 18. VII—29. VII

IV gr. — 29. VII—9. VIII
V gr. — 9. VIII—20. VIII
VI gr. — 20. VIII—31. VIII

La restado por ĉiu grupo daŭros entute 12 tagojn — 10 en la objekto kaj 2 en Sofio (la unuan kaj la lastan). En Sofio la gastoj konatiĝos kun ĉiuj vidindaĵoj. En la programo por la 10 tagoj estas antaŭviditaj promonadoj, sunbanoj, ludoj, kantoj, amuzvesperoj, konatiĝo kun la bulgara folkloro, gastado en montodomoj, tuttaga piedekskurso ĝis montosupro Bogdan, peraŭtobusa ekskurso al la proksima fama muzeo-urbo Koprivštica k. a.

PREZOJ: Por la tuta tempo (manĝado, noktado, trarigardo de Sofio, veturado de Sofio ĝis „Barikadite-Esperanto“ kaj returne):

Ĉambro 2-lita kun aparta duŝo 120 levoj (60 dolaroj)

Ĉambro 2-lita kun etaĝa duŝo 102 levoj (51 dolaroj)

Komuna loĝejo kun etaĝa duŝo 90 levoj (45 dolaroj)

LUADO DE LITO: plej malfrue 14 tagojn antaŭ la komenco de la dezirata grupo per sendo de letero, telegramo aŭ telekso kaj la koncerna pago.

Tiu, kiu ne povas pagi per valuto el sia lando, povas pagi en valuto post sia alveno en Sofio,

ĈION ADRESU AL: Balkanturist, bulv. Dondukov 2, Sofio, Bulgario; teleksa n-ro 22-438; telegrafa adreso „Intur“ — Sofio; telefonoj 88-41-77 aŭ 87-44-81.

SUMOJN EN VALUTO sendu al: **Bankkonto n-ro 44070, Bulgara Nacia Banko — Sofia Filio.**

